

Bo Bergman,  
La lasta stelo

*tradukita de Magda Carlsson*

Nuboj fermas mole  
pordon de l' ĉiel'.  
Tra la vitro sole  
lumas unu stel'.

Baldaŭ Di' estingos  
ankaŭ tiun for.  
Nokto min atingos,  
pezas mia kor'.

*Traduko de la Sveda poemo "Den sista stjärnan" de BO BERGMAN (\*1869-10-06 – †1967-11-17) en Esperanton de MAGDA CARLSSON ((civila nomo: Magda Bohman), \*1896 – †1971-09-07).*

*Arg-492-959 (2009-05-16 09:11:41)*

*Pri la tradukintino Magda Carlsson vidu la vikipedian retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Magda\\_Bohman](http://eo.wikipedia.org/wiki/Magda_Bohman). En la libro "Sveda poemaro" de Magda Carlsson, kiun eldonis kaj aranĝis Frank Luin, troviĝas tiu poemo sur la paĝo 66. Vidu la retejon <http://i-espero.info/files/elibroj/o%20-%20carlsson,%20magda%20-%20sveda%20poemaro.pdf>.*